# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**N° 207 DECEMBRO 2000**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



BRIKOJ , SIMBOLO de KUNLABORO
INTER ESPERANTISTOJ

# Sommaire/*Enhavo*

Pages/*Paĝoj*

| | |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Ehoj el la kontinentoj* | 6 |
| *Protokolo* | 8 |
| *Pilgrimo al Lisieux* | 9 |
| *Nova ZEO* | 11 |
| 15a Ekumena kongreso | 12 |
| Kalendaro | 15 |
| Pri Togolando | 16 |
| Kanto-Preĝo | 18 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 19 |

**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Konstruota preĝejo de Anyronkope en Togolando, ekzemplo de kunlaboro kaj solidareco inter katolikaj esperantistaj grupoj .
(Vidu artikolon en la bulteno)

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 10.a de marto 2000. Venonta bulteno aperos fine de marto.

Finpresado la 23/12/2000

***FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO***

**Nro 207 Decembro 2000**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
3,Allée du Beaujolais
93270 SEVRAN
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

Une nouvelle année commence. Avant toute chose je souhaite qu'elle soit pour vous pleine de joie et de bonheur et remplie de grâce divine.

Bientôt se déroulera la semaine de l'Unité chrétienne. Celle-ci , esquissée par Léon XIII, fut mise en oeuvre par l'abbé Couturier, prêtre du diocèse de Lyon. Aujourd'hui cette semaine de prières,commune aux différentes églises chrétiennes, est bien entrée dans nos habitudes et nous sommes nombreux à y participer chaque année dans les villes où nous résidons. Nous y apprenons à cotoyer nos frères protestants et orthodoxes dans une relation fraternelle et ouverte au dialogue, qui n'exclue pas le respect mutuel de nos convictions en attendant que Dieu réalise cette unité tant souhaitée comme Il voudra et par les moyens qu'Il voudra.

Notre association a toujours entretenu de bons rapports avec celle qui regroupe les espérantistes protestants tant sur le plan national qu'international. De nombreux congrès internationnaux, dits oecuméniques, nous ont réunis dans une atmosphère fraternelle et conviviale. Deux d'entre eux se sont tenus en France, à Viviers (1993) et Nantes (1998) ; lors de notre pélerinage à Lourdes en 1999 nous avons pu apprécier la très intéressante conférence de l'abbé Girault sur le problème de l'oecuménisme.

C'est dire que nous sommes pleinement sensibilisés au problème de l'Unité des chrétiens et que nous aurons à coeur, comme catholiques et comme espérantistes de l'approfondir de notre mieux.

# La Bileto de la prezidanto

Nova jaro komenciĝas . Antaù ĉio mi deziras,ke ĝi estu por vi ĝojoplena kaj feliĉa kaj plena je dia graco.

Baldaù okazos la semajno de la kristana Unueco. Tiu-ĉi, skizita de Leono XIII, estis lanĉita de Pastro Couturier, pastro en la Liona diocezo. Hodiaù tiu preĝosemajno, komuna al la diversaj kristanaj eklezioj enigis niajn kutimojn kaj ni estas multnombraj por partopreni ĝin ĉiujare en la urboj, kie ni loĝas. Ni alkutimiĝas tie frekventi niajn protestantajn kaj ortodoksajn fratojn en frata rilato malfermita al dialogo, kiu ne ekskluzivas reciprokan respekton de niaj konvinkoj atendante, ke Dio realigu tiun unuecon, tiel deziratan, kiel Li deziros kaj pere de la rimedoj, kiujn Li deziros.

Nia asocio ĉiam bone rilatis kun tiu, kiu kunligas la protestantajn esperantistojn, tiel sur la nacia, kiel la internacia kampoj. Multaj internaciaj kongresoj, nomitaj ekumenaj, kunligis nin en frata kaj simpatia etoso. Du el ili okazis en Francio, en Viviers (1993) kaj Nantes (1998); okaze de nia pilgrimo en Lourdes en 1999 ni alprezis la tre interesan prelegon de Pastro Girault pri la ekumena problemo.

Tio vidigas, ke ni plene estas tuŝitaj pri la problemo de la Unueco de la Kristanoj. ni do klopodos, kiel katolikoj kaj esperantistoj, pristudi ĝin .



## UNUECO

Sinjoro Dio,
Vi estas la Dio de la neeblaĵoj.
Vi naskiĝis el Virgulino
El la morto vi faris pordon malfermita al la vivo.
Ni venas al Vi por peti la neeblaĵon:
Via Eklezio fariĝu denove unu.
Kunligu ĉiujn kristanojn en la domo,
Ne en nia eklezio,
Ne en ilia eklezio
Sed en la Via.
ĉu neebla, Sinjoro ?
Tial ni venas al Vi. Amen .

Bruno de Roeck
(mallongita traduko de A.B)

## NE ESTU TRISTA

Ne estu trista -
sola ĉi-Nokte,
Di' vin brakumos
per la manetoj -
donos la gracon
de l'granda amo,
rigard-heligos
per stel-briletoj -

Sentu muzikon
de l'Sankta Nokto
neesprimebla,
inter silento -
Kristo naskiĝas,
Infan' de l'paco.
Anĝel' heroldas
pardono-tempon .



(Leszek Legowski -Pollando)

EHOJ EL LA KONTINENTOJ Laù Letero de Taizé

Kulturo de interrilatoj: Tanzanio.

Dum tridek tri jaroj Bernard Joinet pastris en Tanzanio. Tanzanio estas afrika lando proksima al ekvatoro ĉe Hinda Oceano.Dum sia restado en Taizé li rakontis pri siaj sperto kaj espero: "Kiam mi alvenis Tanzanion mi vidis la prezidanton de la episkopa konferenco kaj mi diris al li: "Verŝajne vi ne bezonas min; vi havas multajn pastrojn". Li respondis: " Veras ke ĉi-jare mi ordinis dek pastrojn en mia diocezo. Ni ne bezonas pliajn pastrojn, sed tra vi ni bezonas fenestron almondan.Se ni restas inter ni, ni fariĝos malliberuloj de nia kulturo, de niaj etaj kaj lokaj demandoj . Por esti kristanoj ni bezonas malfermon al la tuta mondo."

Dudek jarojn mi estis pastro ĉe la medicina fakultato. Matene mi instruis kaj akceptis psikiatriajn pacientojn. Vespere, kiam la studentoj finintis siajn lecionojn, mi pastris . Laborero temis pri helpado de aidosuloj. En la hospitalo unu persono el du mortas pro aidoso. Komence oni pensis, ke aidoso estas rivereto digebla. Sed nun oni spertas, ke temas pri inundo, kiu daùre egiĝas. Kion mi ricevis de Tanzanio? Mi lernis, ke la ĉefaĵo estas havi kiel eble plej bonajn rilatojn kun kiel eble plej multnombraj personoj. Temas pri kulturo rilatocentrita dum en Eùropo oni akcentas efikecon kaj profiton . Tio signifas unuavice scii preni tempon por vivi. Ekzemple en Eùropo oni diras tuj : " Ĉu vi havas fajron ?" En Tanzanio oni diras:" Bonan tagon . Kiel vi fartas , sinjoro ? Kiel fartas la infanoj ? Ha, ili vizitas lernejon ! Kaj via edzino, kiel ŝi fartas ? Ĉu mi povus havi fajron ? " En Tanzanio oni donas multe da tempo kaj da mono al la festoj. Festo indikas ian certan solidaron . Tio estas la renkontiĝo de la klano kaj de la reto amika. Tio permesas montri, ke oni havas amikojn kaj parencojn . El ekonomia vidpunkto eblas opinii, ke malŝpari tiom da mono estas sensenca. Sed el homrilata vidpunkto tio gravas. Festo havas imponan socian valoron des pli ke ĉiu partoprenas en ĝi . Ĉiuj tiuj festoj okaze de edziĝo, konfirmacio, bapto aù entombigo plifortigas la homajn rilatojn. Certe tio kreas problemon: oni grande festas,oni malŝparas, do ne estiĝas ŝparo, investado,disvolvado. Sekve malfacilas por kulturo rilatocentra eniri la ekonomion kaj konkuradon mondajn.



Dua afero frapis min: solidaro. La samfamilianoj interhelpis sin. Ekzemple en la hospitalo,en kiu mi laboris, vizitoj eblas de la 12a ĝis la 14a de la 16a ĝis la 18a. Je la 12a kaj la 16a horoj estas miloj da personoj antaù la pordoj de la hospitalo. Kiam oni malfermas, ondo ulara eniras . Ama ondo. Ili devis preni du busojn, horon kaj duonon marŝi, portante nutraĵon en plastaj skatoloj kaj termobotelojn por prizorgi siajn malsanulojn .Preskaù ĉiuj malsanuloj estas ĉirkaùataj. Tri aù kvar personoj venas al ili ĉiutage. Solidaro estas la sola rimedo por pluvivi. Kiam mankas socia kaj viva kaj malsano-asekuroj, kiam mankas ankaù mono, kio restas al vi ? Tutsimple solidaro kun la grupo. Ne eblas rompi la grupon, ĉar okaze de problemo ĝi estas la sola rimedo por pluvivi. Eksterklane vivi tre malfacilas. Se oni havas bonajn rilatojn la klano apudas, la familio ĉeestas. Solidaro estas do demando de kultura edukado sed ankaù realaĵo ekonomie necesa.

Mi opinias, ke Afriko malrapide evoluas, ĉar ĝi restas fidela je sia kulturo. Klaras, ke, se kiel en Eùropo oni akcentas la profiton kaj la efikon, mankas la tempo por la homaj interrilatoj. Oni centriĝas je siaj propraj problemoj. Dum marŝado malmultas la tempo por saluti. La afrikanoj, kiujn mi konas, respektas sian kulturon. Tial ili ne pretas oferi sian kulturon al la ideo de individua profito. Tial, daùre kredante je la evoluo . Ĉu iu kapablus kritiki iun kulturon, kritiki iun manieron por entombigi parencojn aù por sin interhelpi ene de la familio .?

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 25-A DE OKTOBRO 2000 EN PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière,Pastro Héroux,F-inoj Chaney kaj Michel, Ges-roj Lafargue,S-ro Chevalier,Pons kaj Villeneuve.
Petis senkulpigon :S-roj Basso kaj Colleu.
Observis: F-ino Hervier.


S-ro Villeneuve prezentis la financan staton de la asocio kaj samtempe indikis, ke li deziras esti anstataùita, kiel kasisto.
F-ino Chaney informis pri la pilgrimo en Lisieux, kiu nun estas finpreta. Ĉar, komence de januaro ni devos sendi antaùpagon de 20% al la religia domo, kiu gastigos nin, estus bone ke ,ni ricevu la aliĝojn, kiel eble plej rapide.
Oni ankaù diskutis pri la urboj, kiuj povus akcepti nian kongreson en 2003. Ni studos la diversajn eblecojn kaj decidos post pri la elektota kongresurbo.
En 2001 Kvar postenoj vakos en la Komitato. S-roj Colleu,Pons kaj Villeneuve rekandidatiĝas. F-ino Hervier kandidatiĝas por anstataùigi F-to Marmou, kiu eksiĝis pro malbona sanstato.
Kiel pasintjare ni reklamos sur la gazeto Franca Esperantisto favore al nia asocio.
La prezidanto raportis pri la prezentado de la diocezo Evry sur la reto en esperanto kaj ĝojas pri la uzo de nia lingvo por tio . Same li informis, ke la gazeto "Messages" eldonita de Secours Catholique, en sia septembra bulteno publikigis leterojn de esperantistoj pri la ekzisto kaj uzo de esperanto. Li mem skribis al Messages sendante klarigojn pri IKUE kaj nia asocio.
Pastro Héroux informis, ke la gazeto S-ta Josefo, eldonita de la kongregacio de la Spiritanoj, estas nun parte publikigita en esperanto.
La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la 24-an de januaro 2001.



## PILGRIMO en LISIEUX

La pilgrimo en Lisieux, kiel vi jam scias, okazos de la vendredo, la 4-a de majo posttagmeze ĝis la mardo, la 8-a de majo 2001, post la matenmanĝo.
Ni kune loĝos en "Foyer Louis et Zélie Martin", 15 avenue Ste-Thèrese, 14100 LISIEUX -Telefono :02 31 62 09 33 . Tiu religia domo staras je 900m. proksimume de la staciodomo, en strato iranta al la Baziliko. (vidu mapon ĉi-sube)

**La lasta bulteno publikigis la programon kaj la aliĝilon.**
Se vi ankoraù ne aliĝis, faru tion tuj !
Vi faciligos nian laboron !



## PILGRIMO en LISIEUX-

La prezo estas 1050 FF; ĝi entenas la tranoktadon, la tri tagajn manĝojn kaj la tuttagan ekskurson.
La aliĝkotizo estas :
-ĝis la 15-a de februaro 2001 : 60 F
-ekde la 16-a de februaro 2001 : 80 F
Senpaga aliĝo por junuloj ĝis 25-jara, religiul(in)o, alilandano, blindulo.
La limdato por aliĝi estas la 1-a de aprilo 2001.

La pago estos farita al Association catholique Française pour l'Esperanto CCP Rouen 324 93 N
kaj la aliĝilo sendita al S-ro G.Villeneuve,14 Rue du Clair de Lune 91530 SAINT CHERON, kune kun la pago.

### PROGRAMO

**Vendredon la 4-an de majo 2001**
Posttagmeze : akcepto de la partoprenantoj
18.00 Diservo
20.30 Interkona vespero. Ekzercado de la kantoj.

**Sabaton la 5an de majo**
09.30 Prelego de Pastro Girault pri Sankta Tereza kaj esperanto
14.15 Vizito al la urbo (katedralo Sta Petro, baziliko ktp)
18.00 Diservo 20.30 Distra vespero.

**Dimanĉon la 6an de majo.**
09.30 Ĝenerala kunveno 11.00 Komitatkunveno
14.15 Vizito al la lokoj, kie vivis Sta Tereza (Les Buissonnets,Carmel, ktp)
18.00 Diservo 20.30 Amuza vespero.

**Lundon la 7an de majo**
09.00 Ekskurso al la palaco St Germain du Livet
14.00 Ekskurso al Honfleur
18.00 Diservo 20.30 Adiaŭa vespero..

**Mardon la 8an de majo**
Post la matenmanĝo, fermo de la kongreso.




**Saluton Maria,
gracoplena
La Sinjoro estas Kun Vi.
Benata estas Vi inter la virinoj
Kaj benata estas la frukto de
Via sino Jesuo.
Sankta Maria Patrino de Dio
preĝu por ni,pekuloj,nun kaj
en la horo de nia morto.
Amen.**

### *"SALUTON MARIA"*

en Esperanto: nova ZEO (*)
La 20-an de februaro 2000 en la pilgrimloko en Piani di Boddio apud Lecco en Italio (60km norde de Milano),estis inaŭgurita valora surmura pentraĵo kun la "Saluton Maria" en esperanto. En tiu preĝejo staras jam tiu preĝo en aliaj lingvoj (ĉ 25,inkluzive de ĉina,korea kaj japana).
Okaze de la inaŭguro, monsro Giovanni Balconi, kanoniko de la Katedralo de Milano kaj spirita asistanto de la itala IKUE-sekcio, celebris Meson en esperanto.

* ZEO: Zamenhofa aŭ Esperanta Objekto

Ekzistas "Patro Nia" tabulo de la "Pater Noster Preĝejo" en Jerusalemo (Israelo) . Nun estas pli ol 1100 nomoj de stratoj aŭ monumentoj kun la nomo Esperanto aŭ Zamenhof en 54 landoj.





# 15-a Ekumena Kongreso

**54-a de IKUE** **51-a de KELI**

**14 - 21 Julio 2001**

**en Zagreb, Kroatio**

## Nia temo

# *ADORU*

***La nova preĝ- kaj kantlibro de IKUE kaj KELI***

**Ni kongresos kune kun**

## 5-a JET'2001

**( 5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro)**

**samtempe en la sama kongresejo, sed ofte kun aparta programo**

En la unua jaro de la 21-a jarcento kaj de la 3-a jarmilo de la Kristanismo ni rigardas antaŭen. Ĉi tiu kongreso estos la kongreso de nia portanta fundamento: **Nia Diservo**. Antaŭ ĉio ni volas kune vivi kristane, preĝante por plia progreso de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo. Por pli bona preĝado estos je dispono la novan preĝ- kaj kantlibron ***ADORU***. Ni adoros Dion per Jesuo Kristo en la Spirito.

La kongreso okazos tuj antaŭ la UK Zagreb kune kun la 5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro JET'2001. La ĉambroj disponeblas ankaŭ dum la UK.

Oni atentu la **speciale favorajn kotizojn por familioj kaj grupoj**. Tio estas la ŝanco, kunvenigi parencajn aŭ konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia kristana Esperanto-renkontiĝo. Sed la nombro de subvenciitaj lokoj estas limigita al 30 gejunuloj kaj 6 familioj. Ju pli da Esperanto-konoj kaj -aktivadoj estas pruveblaj des pli granda estas la ŝanco ricevi subvenciitan lokon. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam antaŭ la kunveno komencis lerni Esperanton. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj kaj paroligan kurson.

La kotizoj inkluzivas ekskurson al la nacia kroata pilgrimejo Marija Bistrica.

Ni kore invitas vin aliĝi al nia 15-a Ekumena Kongreso Zagreb 2001
nome de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI:

*Adolf BURKHARDT* por KELI *Bernhard EICHKORN* por IKUE
kaj nome da la Loka Kongresa Komitato: ***Marija BELOŠEVIĆ***



## Aliĝilo

sendota al Marija BELOŠEVIĆ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

*Familioj kaj grupoj bezonas nur unu aliĝilon. La grup-estro aŭ unu el la gepatroj kruc-signu interkrampe kaj metu sian nomon en la nom-linion:*

Aliĝo al ✎ ( ) la 15-a Ekumena Kongreso aŭ al ✎ ( ) JET'2001 en Zagreb

Tuta nomo: ______________________________

Bonvolu skribi vian **familian nomon MAJUSKLE** kaj la **personan nomon** minuskle

Adreso: ______________________________

______________________________

Lando (en Esperanto):____________ telefono: ____________

faksnumero: ____________ reta adreso: ____________

Sekso (signu inter la krampoj): ✎ ina ( ), ✎ vira ( ).

Mi deziras dividi la ĉambron kun: ______________________________

Mi/ni planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): ______________________________

Mi/ni planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): ______________________________

(Nur JET-anoj: La aer-linia distanco de mia loĝ-loko al Zagreb ĉ.:__________km)

(Nur, se malpli ol 25-jara je 14.8.01, notu la naskiĝtagon: __________ )

**Familio aŭ grupo):** Kun mi venos:______________________________

*Skribu ĉi tie la nomojn kaj en krampoj la aĝojn (ĝis 25 jaroj)* ______________________________

**Loĝado**: *Legu unue la informojn sur la dekstra folio, duan parton!*

- Mi/ni mendas ✎ ( ) **plur-litan** ĉambron **en la kongresejo** (unu-litaj ĉambroj en la kongresejo nur en eksterordinaraj kazoj kun 30% kotiz-altiĝo; skribu aparte viajn kialojn, ekz. malfacila ir-kapablo, alta aĝo; du-litaj ĉambroj estas rezervitaj al geedzoj.)
- Ni estas geedzoj kaj petas ✎ ( ) **du-litan** ĉambron **en la kongresejo.**
- Mi/ni mendas **en la hotelo ILICA** ✎ ( ) unu-litan; ✎ ( ) 2-litan ĉambron ✎ ( ) 2-litan pli grandan ĉambron; ✎ ( ) 3-litan, ✎ ( ) 4-litan apartementon
- aŭ **en la hotelo JADRAN** ✎ ( ) unu-litan ✎ ( ) du-litan ĉambron
- Mi/ni ne mendas tranoktadon: ✎ ( )
- Mi/ni volas resti en la kongresejo ankaŭ dum la UK (sen manĝoj): ✎ ( )
- Mi/ni petas vegetarajn manĝaĵojn *(por kiom da personoj?)* ✎ por ( ) personoj

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro):*(Atentu, ke en la limigita tempo de la kongreso ne ĉiuj ofertoj povas esti prezentataj)*

______________________________

______________________________

***La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.***

**Pagmaniero:** Mi pagis la sumon de ____________ je la ____________

✎ ( ) al Banka konto Marija Beloŝević, Zagrebačka banka, Zagreb, Trg B.Jelačića 15, konto numero 2422034108

✎ ( ) al UEA-konto **belo-n**

## Kongresaj kotizoj

pageblaj en kunaoj (kroata mono) aŭ en valutoj de euro-landoj aŭ en US-dolaroj.

**Tarifo A**: Ĉiuj landoj sen B. **Tarifo B**: Eŭropa Unio, Skandinavio, Svisio, Nord-Ameriko

**1. Kongresa aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono:

| | | |
|---|---|---|
| ĝis 31.12.2000: | **A:** 5.- euroj; | **B:** 30.- euroj; |
| ĝis 31.3.2001: | **A:** 10.- euroj; | **B:** 40.- euroj; |
| ekde 1.4.2001: | **A:** 20.- euroj; | **B:** 50.- euroj; |

**2. Kongres-kotizo** aldone pagenda en la kongresejo:

2.1. Tranokto en 2-5-lita ĉambro por 1 persono: **A:** 150.- euroj; **B:** 230.- euroj

2.2. Sen tranoktoj, kun tag- kaj vespermanĝoj: **A:** 80.- euroj; **B:** 130.- euroj

2.3. Familioj 3 - 5 personaj (infanoj/junuloj ĝis 25 jaraj) ĉiuj en la sama ĉambro: **A:** 175,- euroj; **B:** 300,- euroj.

**3. Hotelaj prezoj** (euroj): 7 noktoj (enestas 10%-a rabato, nur per la kongresejo):

| ĉambro: | 1-lita | 2-lita | 2-lita granda | 3-lita apartemento | 4-lita apartemento |
|---|---|---|---|---|---|
| ILICA | 252 | 336 | 420 | 539 | 658 |
| JADRAN | 301 | 371 | --- | --- | --- |

**4. JET'2001-anoj** loĝos aparte, sed en la sama domo. Ili havas grand-parte propran junularan programon.

Partoprenantoj de JET'2001 el A-landoj, kiuj loĝas pli ol 500 km aer-distance de Zagreb, povas ricevi **vojaĝ-subvencion.** Se la loĝ-loko distancas de Zagreb pli ol 500 aer-liniajn km = 20.- euroj; pli ol 1000 aer-liniaj km = 40.- euroj; pli ol 1500 aer-liniaj km = 60.- euroj. Necesas demandi antaŭkongrese pastron B.EICHKORN.

**5. JET-anoj pagas jenajn JET-kotizojn:**

5.1. Unuopaj gejunuloj ĝis 25 jaroj: **A:** 90.- euroj; **B:** 140.- euroj

5.2. Familioj aŭ grupoj ĝis 5 personoj (1-2 responsaj plen-aĝuloj, kaj inkluzive de ĉiuj gejunuloj ĝis 25 jaroj): **A:** 175,- euroj; **B:** 300,- euroj.

Tiujn subvenciitajn kotizojn de 5.2. ni povas financi nur por limigita nombro de 30 personoj. Ju pli da Esperantaj konoj kaj aktivadoj ili pruvas antaŭ la kongreso, des pli granda estos ŝanco ricevi subvencion. Limdato: 1.5.2001. Detalojn demandu ĉe pastro Eichkorn.

---

**Adresoj** de la responsuloj de KELI, IKUE kaj de la LKK:

*Adolf BURKHARDT*, Gimpelweg 1, DE-73235 Weilheim/Teck,
fakso: + 49 7023 72413 < Adolf.Burkhardt@t-online.de >

*Bernhard EICHKORN,* Romäusring 20,DE-78050 Villingen,
fakso: + 49 7721 22074, < Bernhard.Eichkorn@esperanto.de >

*Marija BELOŠEVIĆ,* Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb,
telefono: + 385 1 3745 052, <mbelosev@public.srce.hr>

---

Atentu la kutimajn informojn en DIA REGNO kaj ESPERO KATOLIKA, kaj krome la informojn daŭre aktualigotajn en: *http://home.t-online.de/home/st-fidelis*

**Ĉiuj aliĝintoj ricevos informbultenon, ĉu rete, ĉu per ordinara poŝto.**

La kongesurbo estas trafike bone ligita kun pluraj eŭropaj urboj: * **trajne:** horaro http://www.tel.hr/hz * buse: horaro http://www.tel.hr/autokol-zg * **aviadile:** horaro http://ww.croatiaairlines.hr * **ŝipe** ĝis Rijeka kaj daŭrigi per buso aŭ trajno, ŝiphoraro, http://www.tel.hr/jadrolinija * **informo por ŝoforoj:** Kroata aŭtoklubo http.//www.hak.hr

Kon: A:\ck2001invitilo3.wpd



# KALENDARO

## 2001

Julio ĝis ? — SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl
20-a IKUE E-Tendaro.
Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara frateca kaj amikeca etoso. Venu travivi en ĉarma naturo .
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

14/07 ĝis 21/07 — ZAGREBO(Kroatio)
15-a Ekumena kongreso
54-a IKUE-kongreso
51-a KELI kongreso
5-a Junulara Ekumena Tendaro

25/07 ĝis 01/08 — ZAGREBO (Kroatio)
86-a Universala Kongreso de Esperanto

29/07 ĝis 05/08 — **STRASBOURG (Francio)**
57-a Internacia Junulara Kongreso
www.esperanto.org/ijk2001
Estos biciklan karavanon el Londono kaj el Barcelono.

## 2002

Kromeriz (Ĉehio)
55a IKUE Kongreso
17 ĝis 24-a de aùgusto.

## EKZEMPLO DE ĜEMELIĜO

Nur la amo konstruas ĉie kaj ĉiusence. La kreanto kreis pro la amo, per la amo kaj por la amo.

La natura leĝo mem nur konstruas kaj nenion detruas . Efektive eĉ kiam ĝi ŝajnas detrui, verdire per tiuj cindroj rekonstruas novaĵojn .

La leĝo de la naturo estas la amo, des pli tiu de la homo. Kristo donis novan "Amu Dion kaj la proksimulon unu la alian kiel Mi amis vin" (Jo.13-34). Tia amo ne nur natura sed dia por la kredanto fariĝas potencopova kaj konstruas la personon,la kredanton,la societon,la ekonomion kaj ĉiujn homajn interrilatojn . Eĉ la globa lingva perilo postulas amon kaj obeas la amoleĝon. Do, se ni kredantaj esperantistoj vivas en la amo kaj agadas per la amo kaj por la amo vere konstruas ĉie kaj ĉiusence.

Jen bona okazo fari tion.En Anyronkope, vilaĝo de Togolando, grupiĝis trideko da gejunuloj kaj nomis sian klubon ESPERO . Ekde multaj jaroj Pastro Magnani korespondas kun kelkaj el ties estraranoj. Venis bona okazo por konkretigi la amikecon kun ili kaj kun la tuta ESPERO-grupo: la konstruenda kaj konstrota vilaĝa preĝejo. La letero, substribita ĉu de la parokestro ĉu de la Episkopo, pruvas la konkludon de la longtempa korespondaĵo, garantias la seriozecon de preĝeja projekto kaj la bonfar-neceson. Ĝi ankaŭ konfirmas la ĝojon de internacia katolika kunlaborado kaj bonfarado pere de nia lingva perilo.

Per alia letero la grupanoj aseris ke eventuala monhelpo estus grava pruvo ĉe la kunparokanoj, ĉe la parokestro kaj Episkopo mem, pri la valoro de Esperanto.

La dioceza UECI-grupo de Rimini-Italio akceptis la proponon kaj interkonsente kun la paroko de la Sanktaj Johano kaj Paŭlo de pastro Magnani oni sukcesis dumkaresme monkolekti tiucele 2.500 frankojn. Per retpoŝto jam oni sciigis ilin pri tiu sumo.

Tamen , ĉar la Rimini-UECI-grupo jam ĝemeliĝis kun alia E-juna grupo en Ebura Bordo ĝuste pro tio oni kuraĝas proponi al la aliaj grupoj similan ĝemeliĝon.

Tamen, ni ne forgesu ke ili unue kaj ĉefe bezonas senti nian amon almenaŭ per grupa korespondado.

(el Katolika Sento majo 2000)



## *DE KIE DEVENAS LA VORTO "TOGO " ?*

Tutmonde "Togo" estas konata kiel landnomo (esperantlingve Togolando) de afrika kontinento . Sed certe ne estas ĝenerale konata signifo kaj deveno de tiu-ĉi nomo.

En la pasinteco, antaŭ alveno de koloniistoj (kompreneble el Eŭropo), nia lando ekzistis sen aparta nomo, dividita en malgrandajn regionojn, kie regnis patriarkoj aŭ militestroj. Tiu periodo estis markita ankaŭ de reĝoj, inter kiuj indas mencii la famkonatan ĉefon Mlapa la 3-an de la urbeto "Togoville". La 5-an de julio 1884 okazis inter li kaj germana komisiito, nome Gustave Nachtigal, la subskribo de protektkontrakto en urbeto Baguida. Togoville estas apudlaga urbeto. De Baguida oni atingas ĝin transirante la lagon per pirogo. Tial tiuj, kiuj volis vojaĝi en la lokon de la reĝo, petis de pirogistoj transporton al la alia bordo (= go aŭ godo) de la lago (=to) laŭ sekva frazeto: "Mi volas viziti la alian bordon de la lago", kio signifas nacilingve al "Togodo" aŭ "Togo". De tiam ofta ripetado de lagbordo (Togo) iĝis kutimo. Tiel "Togo" fariĝis la nomo de la reĝurbeto. Ankaŭ ties lago nomiĝas "Lago-Togo" (Togoto).

Aŭtomate eksterlande "Togo" estis konsiderata kiel nomo de la lando mem ĝis hodiaŭ.Kvankam oni nuntempe nomas la urbeton "Togoville" anstataŭ "Togo",multaj enloĝantaoj konservas la malnovan nomon "Togo".(Sagbadjelou Kokou el Dio Benu Nro 29)

*Ĉu vi havas ankaŭ ekzemplojn de ĝemeliĝo pere de esperanto por rakonti al legantoj ?*
*Skribu artikolon al la redakcio.*

## MI VIN DANKAS, HO MIA SINJORO

(TI RINGRAZIO, O MIO SIGNORE)




2. Kiel pano de Vi disrompita / estis spike surkampe falĉita, / tiel Vi nin bonvolu kunigi / en mistika vera Korpo de Krist´. Ref.: Haleluja ...
3. Tiu amo fontanta de Dio / estu forto por ĉiuj gefratoj / kaj al mondo petanta la pacon / vian pacon donu ĉiam al ĝi. Ref.: Haleluja ...

**Elektronikan version de DIO BENU vi povas trovi sur jenaj TTT-paĝoj:**

http://home.t-online.de/home/b.eichkorn/
http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek/

el DIO BENU

## AUSKULTU VATIKANAN RADION

En esperanto la elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno , en la sama horo 21.20 MET

DIMANĈE - Horo 21.20 laù mezeùropa tempo (10')
Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005 (74.90 m), 5880 (51.0m)
Satelite : INTELSAT 325,5° East 4097.75 Mhz Polarizadon LHCP

MERKREDE kaj JAUDE : Horo 21.20 MET
Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 7250(41.37m),9645(31.10m)
Satelite: INTELSAT 602.62° East 4097.100 Pol.LHCP)
Interreto: sama horo
http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia
aù http://www.vaticanradio.org )

**Vizitu http://www.ikue.org**

## Kotiztabelo 2001

| | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU<br>3,Allée du Beaujolais 93270 SEVRAN<br>P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto unuopulo : | 60 | 9,15 |
| geedza paro : | 80 | 12,20 |
| gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 4ème trimestre 2000 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO